*Aperis en: GrKG/H 44/3, Sept. 2003, p. 170–171*

**Protokoko de la 50a senatkunsido (44a post la oficialigo de AIS fare de la Konsilio de la XII, 53a post la fakta eklaboro) okazinta en la paroĥejo de S-taj Paŭlo kaj Johano, Rimini / San Giuliano Mare (IT).**
Dimanĉo, 2003-08-31, 10:00 h – 12:30 h,
lundo, 2003-09-01, 21:40 h – 23:00 h,
mardo, 2003-09-02, 16:00 h – 19:00 h,
ĵaŭdo, 2003-09-04, 20:45 h – 24:00 h.

Ĉeestantoj: senatanoj Fössmeier, Frank, Holdgrün (ne je 08-31), Lewoc (ne je 08-31), Minnaja, Quednau, Pennacchietti, vicsenatano Angstl (parte). Kolego Wickström antaŭe anoncis sian neĉeeston, kolego Maitzen ne povis veni pro gravaj kaj neantaŭvideblaj personaj kialoj.

*1 Formalaĵoj*

Laŭ antaŭa decido la protokoloj estu faritaj tiel, ke ili povu aperi en la sekva ankoraŭ ne finfarita numero de la revuo GrKG/H; tiel ne okazis pri la protokoloj de la februara sesio en Sibiu. Tial laŭdecide la informofico transprenas la protokoladon.

*2 SUS-programo kaj -organizado*

2.1 La senato decidas, ke pri la eldono de kursatestoj kaj aliĝo al kursoj respondecas nur la klerig-ofico. Dum SUS 26 la klerig-ofico transprenu ankaŭ la enkasigon de la ekzamen- kaj SUS-kotizoj, se iuj restas pagendaj. Tiu decido okazas antaŭ la alveno de OProf. Holdgrün, kiu post sia alveno proponas nuligi ĝin. Tiun nulig-proponon la senato malakceptas per kvar voĉoj kontraŭ tri ĉe unu sindeteno.

2.2 Dum SUS 26 la ekzamenofico konsistu el jenaj personoj:

| | konstantaj membroj | aldonaj membroj |
|---|---|---|
| Sekcio 1 | OProf. Fössmeier | OProf. Frank |
| Sekcio 2 | OProf. Pennacchietti | OProf. Korĵenevskaja-Gouriou |
| Sekcio 3 | OProf. Holdgrün | OProf. Minnaja |
| Sekcio 4 | OProf. Angstl | – |
| Sekcio 5 | OProf. Maitzen | OProf. Quenau |
| Sekcio 6 | OProf. Lobin | OProf. Poláková |

2.3 Anstataŭ la kurso de la ne alveninta prof. Ŝilo okazu kurso de OProf. Angstl en sekcio 4, kun la titolo „Baza enkonduko en la propoz-logikon kun ekzemploj kaj ekzercoj“. Ĉar la aliĝintoj de *symposium latinum* ne povis veni, la kurso de PDoc. Barandovská-Frank okazu en ILo en sekcio 2, kun la titolo „De Latino sine flexione centjara“.

2.4 La akademia forumo okazu sub la temo „La tria jardeko de AIS: Kio estas atinginda, kio estas atingebla, kio estas atingenda?“ Gvidu la forumon OProf. Pennacchietti.

2.5 La senato unuanime proponas al la ĜA jenan proceduron por la elekto de la vic-senatanoj kaj ilia vicordo: Por elekti $n$ vicsenatanojn ĉiu voĉdonanto povu doni al siaj preferataj kandidatoj po nombron inter 1 kaj $n$, sed rajtas uzi ĉiun nombron nur unufoje. Por ĉiu kandidato oni adicias la ricevitajn nombrojn; la kandidatoj kun la $n$ plej altaj sumoj estas elektitaj. Pli alta sumo donas prioritaton en la vicordo.

*3*

Post la alveno de kolegoj Holdgrün kaj Lewoc protokolanto Fössmeier laŭtlegas por ili la faritajn decidojn. ADoc. Lewoc proponas, ke Fössmeier faru la protokolon kiel ano ne de la inform-, sed de la protokol-ofico. La propono estas rifuzita per 5 kontraŭ 2 voĉoj.

*4 Premio Pirlot*

La forestanta direktoro de la honorofico proponu al la Senato almenaŭ du verkojn por reta decido pri la atribuado de Premio Pirlot.

*5 Alvokoj*

ADoc. Dr. Butan plenumas la kondiĉojn por akiri la rangon de plenrajta docento laŭ maniero V (RD 5.3). OProf. Pennacchietti kiel estro de la docentigkomitato rekomendas ŝian alvokon. La senato unuanime akceptas kaj bonvenigas la novan efektivan membron.

*6 Studado*

6.1 La senato unuanime aprobas la kadran regularon por docentiga studadkompletigo verkitan de OProf. Poláková kaj OProf. Frank kaj komisias al ili, kune kun la honora senatano OProf. Selten detaligi la studadplanon konsiderante la disponeblan kapaciton.

6.2 La Senato rekomendas al la Ĝenerala Asembleo preskribi per reviziotaj regularoj, ke finstudinteco sur nivelo inter du niveloj difinitaj por la kvar gradoj de AIS (ekzemple diplomo de germana fakaltlernejo, kiu estas pli proksima al magistreco ol al bakalaŭreco) estu adapte adoptebla sur la pli alta nivelo, se la kandidato aŭ akiras adekvatan kvanton da studunuoj (laŭ decido de la ekzamenofico, ne malpli ol 10 kaj ne pli ol duonon de la kvanto

necesa por originala akiro de la celata grado) aŭ finis la studon, kies adaptan adopton li celas, per tre bona (10/10) aŭ almenaŭ bona (9/10) rezulto.
6.3 La Senato decidas, ke partopreno en kursfinaj ekzamenetoj eblas ankaŭ sen partopreno en la koncerna kurso; tiaokaze por sukceso necesas almenaŭ rezulto de 7/10.

*7 Klerigejoj*

La Senato konstatas, ke momente ekzistas aŭ ekestas tri funkciantaj filioj kun klerigejoj de AIS:

A la rumana filio kun la fakultat-departemento en Sibiu-Hermannstadt sub la gvidado de OProf. Frank, OProf. Minnaja kaj ADoc. Konnerth-Reisenauer,

B la slovaka filio kun la starigata Libera Eŭropia Universitato Komárno sub la rektoreco de OProf. Selten HMdAIS, OProf. Poláková kaj OProf. Frank,

C tria tia filio kun klerigejo en Karlovo, por kiu ĝis nun estas nomumitaj du eksterordaj profesoroj (ADoc. Leonov kaj ADoc. Lewanderska). Tria EProf. por tiu filio fariĝu prof. Ralev, rektoro de la ŝtata universitato de Burgaŝ (BG).

Rilate la restarigon de la pola filio la Senato komisiis la necesajn preparlaborojn al EProf. Lewanderska-Quednau.

*8*

OProf. Minnaja **demisias** kiel direktoro de la ekzamen-ofico. La senato elektas kiel novan direktoron OProf. Lobin.

Rimini, 2003-09-06 Protokolis: Reinhard Fössmeier